# EKO 2025

ILEI kaj UEA kongresas

EKO 2025-32, Augusto 3  Pezo: 800 KB, Alkroĉaĵo UN

## ILEI kongresas en Beograd...

Jen la prelego de s-ro  Wu Jing de la Pekina Universitato por la Simpozio de ILEI 2025 ("AI kaj kulturo"): Simpozio de ILEI 2025: Wu Jing
Jen la prelego de Shanshan Chen el la Simpozio de ILEI 2025, "AI kaj kulturo."
Simpozio de ILEI 2025: Shanshan Chen

Jen la prelego de Simir Ribiĉ:
Simpozio de ILEI 2025: Samir Ribić

Jen eroj el la kongresaj tagoj:
https://youtu.be/gAF4Sc4fJ7I?si=eOuFqoMJFIoi5yg7

Jen la Kongresa  Rezolucio:
https://youtu.be/oADkwJ-_ao8

## ...kaj UEA en Brno

Al la 110-a Universala Kongreso de Esperanto, kiu jam ekis en Brno, jam aliĝis 1103 personoj el 63 landoj plej multe el Ĉeĥio (130), Germanio (120) kaj Pollando (106).
Legu pli en la novaĵretejo *La Ondo de Esperanto*
https://sezonoj.ru/2025/07/brno-28/



110-a Universala Kongreso de Esperanto, Brno 2025

"La Drako de Brno" estas la titolo de la ĉiutaga kongresa kuriero de la 108-a Universala Kongreso de Esperanto, kiu nun okazas en Brno. Ĝin redaktas Miroslav Malovec. Jam aperis tri eldonoj; la sabata kaj dimanĉa estas kvarpaĝaj, sed la lunda estas dupaĝa. Legu pli ĉe https://sezonoj.ru/2025/07/brno-30/ kaj elŝutu la kongresan kurieron.

## Nova estraro por UEA ĝis 2028

Jen la teamo por la sekva periodo. La EKO-komuniko gratulas ilin kaj deziras fortajn sukcesojn en la senlaca laboro!



Do, temas pri naŭkapa laborteamo. El kiuj tri estas virinoj. Laŭkontinente: unu loĝas en Ameriko, du en Azio, kvar en Eŭropo kaj du en Afriko.



## Ekzamenoj en Brno

Matene okazis duobla leciono kun plena salono, kaj posttagmeze C2-parolaj ekzamenoj. Sukceson al la partoprenontoj el Kanado, Brazilo, Francio, Slovakio, Svedio, Irlando, Ĉinio, Germanio kaj Usono.

## Novelkonkursaj rezultoj

La kvaran eldonon de la I*nterkultura Novelo-Konkurso,* kiun organizas Akademio Literatura de Esperanto (ALE) kaj Bobelarto, kun la aŭspicio de UEA, partoprenis 689 konkursantoj el 42 landoj. Alvenis 805 konkursantaj noveloj. La ĵurio disdonis entute dek premiojn: kvin en la sperta kaj kvin en la komencanta kategorioj. La gajnintaj kaj finalistaj noveloj aperos en la novelaro *Kie vojoj renkontiĝas*, kiu estos publikigita en aprilo 2026. La novelaron eblos mendi tra la Libroservo de UEA kaj la eldonejo KAVA-PECH. La ĵurio konsistis el: Ivan Colling (Brazilo), Heidi Goes (**BE**), Kitagawa Hisasi (JP), Paŭlo Moĵajevo (UA), Anna Striganova (RU) kaj Francisco Wechsler (BR).

## Simpoziaj Aktoj de ILEI alportitaj

"Mi estas portanta al Brno pli-malpli 40 ekzemplerojn de la Aktoj de la Simpozioj de ILEI 2022-23. Kiel vi scias, por festi la 75-jariĝon de la Ligo, la estraro decidis donaci senpagan kopion al la sekciestroj kaj komitatanoj de ILEI, laŭ la nuntempa listo en nia retejo. Do, bonvolu veni preni vian ekzempleron, se vi ĉeestas en Brno. Mi portos la librojn al la Movada Foiro, Prezento de ILEI, Tago de Lernado kaj Prezento de la Fakaj Asocioj. Se vi mem ne ĉeestos, vi povas diri al mi la nomon de alia homo, kiu povos preni vian kopion. Mi ne scias, ĉu 40 ekzempleroj de la libro sufiĉos por ĉiuj, sed bedaŭrinde mi devas parte vojaĝi trajne kaj tio estas la maksimuma pezo, kiun mi sukcesos kunporti. Do, bonvolu veni al mi frue, por trafi vian ekzempleron!. Ni havos 1200 malnovajn IPR kaj JA por senpaga disdono, ne nur al ILEI-anoj, en la samaj tempoj kaj lokoj."

Alessandra Madella

## Nova bitlibro el Hungario

Vi povas ricevi la novan eron de la bitlibra serio de HEA ĉe:

https://www.facebook.com/jozsef.horvath3

Jozefo Horvath,www.vortaro.hu

## Ondo da historio

Antaŭ 138 jaroj, la 26-an de julio 1887 en Varsovio aperis la broŝuro "Internacia lingvo. Antaŭparolo kaj plena lernolibro (por Rusoj)" [Международный языкъ. Предисловіе и полный учебникъ (por Rusoj]", konata nun kiel la Unua Libro. Ĝia aŭtoro, la 27-jara Lazarj Markoviĉ Zamenhof, kaŝis sin sub la pseŭdonimo "D-ro Esperanto". Ĉi tiu dato, la 26-a de julio, estas ĉiujare festata kiel la naskiĝtago de Esperanto. La redakcio de *La Ondo de Esperanto* gratulas ĉiujn esperantistojn kaj amikojn de Esperanto okaze de la hodiaŭa festo kaj proponas (re)legi la artikolon de la Ruslanda ĵurnalisto Aleksander Korĵenkov pri la Unua Libro https://sezonoj.ru/2020/07/unua/

## N La plej alta tamen facile alirebla

Aperis artikolo  en la retejo uea.facila.org, kiun prizorgas **Anna Lowenstein** kun siaj kunlaborantoj (https://uea.facila.org/kunlaborantoj/).
La artikolon verkis **Craig Williams** kun la titolo **La plej alta konstruaĵo en la mondo**, kaj voĉlegis ĝin **Derek Roff**:
https://uea.facila.org/artikoloj/lega%C4%B5oj/la-plej-alta-konstrua%C4%B5o-en-la-mondo-r483/

## La bulteno de UEA pri UN aperis

**Numero 77 – julio – aŭgusto 2025**

- La Studogrupo pri Lingvoj kaj UN traktis "multikrizon".
- Okaze de la Internacia Tago de Espero, UEA proponas sian fortan subtenon.

La bulteno aperas en la angla, franca kaj Esperanto kaj estas alkroĉita..

## Vinilkosmo komunikas muzike

GRAVA INFORMO por la uzantoj de diMusic kaj de la ABONKLUBO de VINILKOSMO.
Legu pli ĉi tie:
https://www.vinilkosmo-mp3.com/eo/blogo/437-grava-informo-por-la-uzantoj-de-dimusic-kaj-de-la-abonklubo-de-vinilkosmo.html

## Togolandaj sukcesoj

En septembro 2024 komenciĝis la lerneja jaro 2024-25. La kursoj  kaj provekzamenoj okazis ĝis junio 2025. Tiam la gelernantoj trapasis la ekzamenojn por iri al supera klaso aŭ  diplomiĝi. Julie  proklamiĝis la rezultoj.

## Aŭstraliazianoj triumfas

La komitato de UEA en Brno ĵus anoncis tri novajn honorajn membrojn – unu el Nov-Zelando, unu el Aŭstralio kaj unu el Koreio. Aŭstralazio elstaragita! La Eo-movado vere tutmondiĝis.

========= vortoj: 1120 =========

Kunlaborantoj: Rob Moerbeek (NL), Elda Doerfler (IT), Frank Lappe (DE)

Jen la plej gravaj partneroj de la EKO-komunikoj
Universaleco, Instruistoj, Fervojistoj, Medicinistoj, Komercistoj, Blinduloj, Kolektantoj

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2800 ricevantoj

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: https://www.ilei.info/agado/EKO.php

**Tridek numeroj de 2025 aperis, kune kun la kvardek kvar numeroj de 2024**

**ALDONU Aŭ SUBTRAHU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Por forigo, laŭeble informu min al kiu ekspedo-grupo vi apartenas. Mi povas forigi nur personojn kies retadresoj estas individue enskribitaj. Ne eblas forigi homojn, kiuj ricevas la komunikojn pere de retlisto.